
# La Krokodil’



**Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**
1 place des Avions, 31400 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
http://esperanto.toulouse.free.fr/

**N° 40** - ***junio 2006***

**ene : *La Cirkulero de Midi-Pyrénées***

**Enhavo** p

**OKAZOS** (ne ratez pas) 1
Scène ouverte au Bâton à Palabre 1
Manĝo-klaĉo en Balma 2
Semajnfino en Arrout 16-17 sept. 2
Nordkatalunio Renkontiĝo 2
Regiona semajnfino Adervielle 2
…kaj en Afriko! 2

**OKAZIS** (nous avons fait)
Au Bâton à Palabre 3
Junulaj manĝo-klaĉoj 3

**Cirkulero de Midi-Pyrénées** 4
Hautes Pyrénées 4
31 Tuluzo 5
jOmO : nova disko, nova libro 7
Tarn 7
Ariège 8
Aveyron 8
Opinio 8

**Saluton !**

La verda *krokodilo* denove informas vin, sed ĉifoje en vesto de Cirkulero de Midi-Pyrénées. La redaktoro, kiu redaktas ambaŭ bultenojn, trovis pli efike kaj utile kunmeti la du informilojn, tiel ke ĉiu ricevos novaĵojn pri la tuta regiono, kaj foje eĉ pli, ekz. pri Montpellier aŭ Afriko.

En la «krokodilaj» paĝoj vi trovos pli specifajn tuluzajn anoncojn. Kaj kalendaron de okazontaĵoj.

Bonan somerumadon ! *J.M. CASH La redaktoro*

Kalendaro

**Junio**
Jeu 29 Scène ouverte au Bâton à Palabre
**Julio**
Ven 7 Manĝo-klaĉo en Balma (ĉe Lafosse)
**sept**
Mar 12 Début Cours Express
16.17 Semajnfino en Arrout (09)
30-01 okt Nordkatalunia Renkonto -Vallmanya (Conflent)
**Okt**
Sab 07 Journée des associations
7 -8 Regiona Semajnfino en Adervielle

# Okazos *Ne ratez pas…*

## Scène Ouverte au Bâton à Palabre – 29 juin 2006 à 20 h

15 rue de Thionville, 31000 Toulouse (Café Le Bâton à Palabre)
participation : 5,50 € (consommation avec une assiette chaude ou froide)

*Pour fêter la fin de la saison, le DEBAT mensuel au Bâton a Palabre se transforme en « SCENE OUVERTE » pour tout spectacle en espéranto. Kontakto :* Hélène FUNEL, 0561627951 & 0872410363

# Manĝo-klaĉo en Balma: vendredon la 7-an de julio

Lastfoje en la sezono, ni kunvenu kaj kunmanĝu ĉe la lageto Saint-Clair, proksime de Josée-hejmo.

Je la 20-a horo, apud Impasse Gabriel Voisin en Balma. Haltu ĉe la lageto, estas benkoj kaj tabloj. Kromaj seĝoj tamen bonvenos. En okazo de malbona vetero, Josée kaj Michel akceptos nin en sia domo.

# Semajnfino en Arrout (09) 16-17 septembro

Deux niveaux : Initiation ou perfectionnement/conversation, du samedi 10 h au dimanche 17 heures.
10 heures de cours, soirée animée par les participants (apportez vos idées et instruments de musique).
Le prix inclut 2 repas, la nuitée en chambre de 3 ou 6 lits, et petit-déjeuner.

| | | |
|---|---|---|
| Tarif (sous réserve) : | Adhérent d'EKC | 30 € |
| | Non adhérent | 48 € |
| | Non adhérents étudiant/chômeur | 39 € |

# 4a Nordkatalunia Renkontiĝo 30 sept – 1 oktobro

KEA invitas vin en 66 -Vallmanya (Conflent Nord-Katalunio).
Pliaj informoj ĉe: http://www.esperanto.cat/material/200609_vallmanya.pdf

## Regiona renkontiĝo en Centraj Pireneoj :

# Semajnfino en Adervielle (Hautes Pyrénées) 7-8 oktobro

Saluton el ESPERANTO-GIRONDE,

Ni planas organizi E-Regionan Renkontiĝon en Pireneoj, dum semajnfino, 7-8a de oktobro 2006.

Nia renkontloko estos Domo de Naturamikoj, en vilaĝo ADERVIELLE, sur la montpasejo Peyresourde, inter Arreau kaj Luchon.

Tiu domo kostos al ni 5 eŭrojn tage por la naturamikaranoj; kaj 10 eŭrojn tage por la aliaj . Ni mem preparos la manĝojn; do la ĝeneralaj kostoj ne estos tre altaj. Pri la programo: kunvenoj por interŝanĝi pri niaj diversaj agadoj kaj pri la organizado de la venonta SAT-Amikara kongreso; ni ludos, kantos kaj promenos en la montaro. Eŭskaj E-amikoj ĉeestos.

– Joël Lajus

## ... et, un peu plus loin :

# En Afrique

### 1. Burundia Kongreso

Komence de aŭgusto, de la 7-a de aŭgusto 2006 ĝis la 11-a, okazos en Rumonge, Burundio, la unua esperanto-kongreso.

Ĉar temas pri kongreso aranĝata de lokaj esperantistoj, kiuj neniam ĉeestis naciajn kongresojn, partopreno de eksterafrikaj esperantistoj, kiuj povus doni ekzemplojn de parolata esperanto, prelegi, gvidi kurson, ekzameni, ktp., estus tre, vere tre bonvena.

Se vi pretas proprakoste partopreni tiun kongreson, la sperto estos por vi neforgesebla, kaj vi eniros la historion de esperanto en Burundio. Oni vere bezonas vin tie.

– SABIYUMVA Jérémie
BP:170 RUMONGE – BURUNDI Télephone (+257)733052 sabiyumva jeremie
jerrybs21@yahoo.fr

**2. YMCA-ESPERANTO-KLUBO «PARCELLES ASSAINIES», DAKAR, SENEGALO, invitas vin al ESPERANTO-RENDEVUO de la 1-a ĝis la 20a de aŭgusto 2006**

Programo:
– Estado en familioj
– Vizitoj de kelkaj turistaj pejzaĝoj
– Labortendaro 10 tagojn, je 50 km de Dakaro
– Renkontiĝo kun la esperantistoj de la YMCA-klubo

Kotizo por la labortendaro: 50 eŭroj
Por pli da informoj bonvolu kontakti:
YMCA-ESPERANTO-KLUBO, BP 26375 PARCELLES ASSAINIES, DAKARO, SENEGALO
http://esperanto.senegalo.free.fr/ParcellesAssainies.php
christophe47ba_nespamu@hotmail.com [bonvolu forigi la parton _nespamu]

– http://www.eventoj.hu/2006.htm

# Okazis

## En Bâton à Palabre – Temo: Ĉu homoj bezonas religion?

La 31-an de majo kunestis por la lasta debato monata geedzoj Funel, R. Pontnau, J. Lafosse, J. Caubel, kaj ankaŭ neesperantisto kiu volis aŭdi la sonon de esperanto! Li estis sola favora al la religio. La diskuto estis interesa. Iuj progresis kaj parolas pli flue ol antaŭe.

– Jacques CAUBEL

## Junula Manĝo-Klaĉo ĉe Pere la 12-an de majo

D'habitude, je rappelle toujours, un ou deux jours avant, aux intéressés, la date du *Junula Manĝo-Klaĉo*. Ce mois-ci, j'ai oublié. J'ai mal fait mon boulot, et quand Marie et moi sommes arrivées chez Pere qui était tout seul, on s'est dit que ce serait en cercle très restreint, ce soir là. Qu'à cela ne tienne ! Pere nous a montré la *Farbskatolon* sur Internet, et on a bien rit (http://farbskatol.net/). Merci Axel !

Mais les jeunes Toulousains sont arrivés à l'heure espagnole (normal, c'était chez Pere) pour manger. Les deux couples d'informaticiens que sont Thomas et Mélanie et Ségolène et Ludovic nous ont donc fait l'honneur de leur présence. Nous avons des preuves (voir la photo).

– Katrin.

## … kaj la 8-an de junio ĉe Kristof.

**Manĝo-klaĉo en Belcastel**, la 9-an de junio (vidu en la *Cirkulero* de Midi Pyrénées)
Stands divers (voir la *Cirkulero* de Midi-Pyrénées).

# Cirkulero de Midi-Pyrénées

**junio 2006**

**ESPÉRANTO MIDI-PYRÉNÉES**
p.a. Esperanto-Kultur-Centro
1 place des Avions, 31400 Toulouse
T. 05 61 25 55 77, esperanto.toulouse@free.fr

Tiu Cirkulero rakontas pri okazintaĵoj en la regiono. Ĝi aperas ĝemelita kun *La Krokodilo*, bulteno de Tuluzo, en kiu legiĝas ankaŭ kalendaro de estontaj eventoj, en kaj ekster la regiono.

– Jeanne-Marie

# (65) Esperanto reaperas en Tarbes

Esperanto-65 starigis budon la 13an kaj 14an de majo dum Asocia Forumo en Tarbes.

Deĵoris kvaropo Frederic SCIBOR el Pau, Pierre-Laurent SCHERRER, Timur GOSSET, kaj Robin BETEAU el Esperanto-65. De jaroj esperanto ne plu videblis en la departemento altpirenea kaj dank' al ege grava subteno de Gilbert DARRIEUX kaj Françoise CARRIEU (dormi en komfortaj litoj kaj manĝi bongustaĵojn en amika etoso ja helpis nin multe!), ni povis denove vidigi ĝin.

Rezultoj ne malbonas (ĉi tiu laboro estas nur komenco de longdaŭra informado): kelkaj homoj montriĝis interesitaj pri informado pri aŭtuna malfermo de E-kurso en Bagnères de Bigorre kaj Tarbes…. Estis ankaŭ interesaj unuaj kontaktoj kun altpireneaj asocioj, kun Radio PIC FM (por E-prezenta elsendo), kaj kun S-ro Pourchier, vicurbestro pri asocia vivo de Tarbes.




Tiu aranĝaĵo estis grava ankaŭ por nia tutnova asocio: estĝis nukleo aktivula por kolektiva agado (nia celo ne estas, ke estu iu "klub-respondeculo" sed, ke ĉiuj estu mem-respondecaj). Ĝi estis ankaŭ okazo por ankoraŭ pli kuraĝigi nin rilate nian agadon (ni provas dufoje monate starigi budon ĉe la semajna bazaro en Bagnères de Bigorre), kaj interparolante kun Frédéric (ja grandan amikan helpon

de li ni ricevis), bildigi al ni estontan kunan agadon de Langue Esperanto-64 kaj Esperanto- 65 – “Najbaroj, unuiĝu!”, diris Zamenhof.

Do ek al la labor’ granit-trabora!

## (65) Bagnères de Bigorre

Ni regule starigas inform-budon dum la sabata bazaro de Bagnères. Tiu agado estas konsiderata de ni kiel longtempe efika por iom post iom enkapigi al la homoj ke esperanto ĉeestas denove en la regiono.

Ni intencas starigi budon kun aktivaĵoj por infanoj dum la festivalo, kun interesaj ludiloj pri temoj “monda solidareco”, “naturmedia protektado”, ktp., por igi infanojn unuafoje kontaktiĝi kun esperanto.

## **Festivalo « La Terre c'est ma nature »** – Bagnères de Bigorre, (23-24-25ajn de junio)

ESPERANTO 65
chez Robin BETEAU
Village
65130 FRECHENDETS
tel : 05.62.91.28.76
rete : pl-esperanto@neuf.fr

# (31) Tuluzo:

## *Festival CAMINO, Agir pour la non-violence*
## Tournefeuille (31), la 1-2-3-ajn de junio.

Dum tri tagoj, tiu Festivalo kunigis spektaklojn, artaĵojn, filmojn, prelegojn, debatojn, pri iniciatoj rilataj al agado neperforta por pli bona mondo. En la «asocia vilaĝo» estis dekoj da standoj kiuj prezentis agadojn de asocioj. Inter ili estis esperanto-stando, ĉe kiu deĵoris sinsekve deko da tuluzaj esperantistoj. Kvankam nemezurebla, la efiko de nia informado estas aparte utilia en ĉi tiu medio, kie ni renkontas volontulojn de verdulaj movadoj, kiel Greenpeace, de homrajto-defendantoj, kaj aliaj similaj humanismaj movadoj. Okazis prelego de Albert Jacquard….

– Jeanne-Marie CASH

## Tuluzo: Respondo de Albert Jacquard

Post la ege interesa prelego de Albert Jacquard, mi estis la unua demandanto (li devis rapide foriri, do nur kelkaj demandoj povus okazi).

“Por bone komuniki inter homoj kies lingvoj estas malsamaj, ĉu vi ne opinias ke ni bezonas komunan internacian lingvon?”

Kiel atendite, A. Jacquard bonege respondis: “Estas nepre necesa havi komunan lingvon. Oni provas trudi al ni la anglan. Mi estas komplete kontraŭ tiu trudo: unue, la angla lingvo estas malfacila, ĉefe por la francoj; kaj ĉefe, tiu trudo donas en ĉiu internacia debato regecon por la denaskaj angloparolantoj. Mi do rekomendas la uzon de dua komuna helpa lingvo, tre facila, tre riĉa, kiu de pluraj dekoj da jaroj faris siajn pruvojn: esperanto.”

Pli ol tri kvaronoj de la 400 ĉeestantoj varme aplaŭdis. Neniu siblis....

– Emile MAS

## TULUZO : autres stands

## Journée de l’Europe – 9 mai

Ce jour-là nous avons partagé un stand avec l'association Itinéraires Internationaux, qui s'occupent d'envoyer et recevoir des Jeunes Volontaires Européens… qui nous aide maintenant à concrétiser notre projet d'accueillir un(e) JVE espérantiste l'année prochaine !
Méritoire a été la prestation de Primaël, qui a chanté, accompagné de deux guitares, deux chansons en espéranto en boucle durant plus d'une demi-heure (un poème de G. Camacho qu'il avait mis en musique, et l' « Hymne européen », 9 mai oblige…). En effet, les organisateurs avaient oubliés de laisser la sono !

## Forum des Langues – 28 Mai

Un stand pour cette manifestation traditionnelle à Toulouse, et un minicours d'espéranto.




## Stand à l'Eté à l'Asso (fête des quartiers sud-est toulousain), 10 juin
et aux **Journées Mondiales de la Jeunesse Solidaire,** 12-13 avril

**TULUZO :**
## Esperanto-kluboj en mezlernejoj kaj liceo

Jam finiĝis la kluboj en liceo Saint Sernin, sed ankoraŭ daŭras en du mezlernejoj.
En Collège Jean Moulin, la klubanoj prezentis pupteatran spektaklon dum le lerneja festo: sceno de *La Eta Princo* – kiam la Eta Princo renkontas la vulpon – laŭ la traduko de Pierre Delaire.

# jOmO: nova disko kaj… romano !
prezentita de Vinilkosmo, eldonisto en Tuluzo

**jOmO** (*Jean-Marc LECLERCQ*) havas sufiĉe netipan vivovojon. Vidu mem:

Li renkonteblis en la jaroj 90 en la tuluza rok-bando de la **ROSEMARY'S BABIES** (*Rozmariaj Beboj*), aŭtoroj de du albumoj, el kiuj unu ĉe fama franca diskeldonejo **BOUCHERIE PRODUCTION**.

Li videblis dum la jaro 2000 en la **GUINNESS-a LIBRO da la REKORDOJ** ĉe rubriko «Lingvoj», pri koncerto de **22** kantoj en **22** lingvoj.

Li retroveblis en la jaroj 2000 ĉie en la mondo, kantante **ESPERANTE**, (Germanio, Ruslando, Ukraino, Usono, Pollando, Brazilo, Bosnio).

Li rimarkeblis en januaro de 2003 sur scenejo de famaj parizaj salonoj **OLYMPIA** kaj **GAVEAU**, ludante balalajkon kun grupo de orienteŭropa muziko.

Li malkovreblis en 2004 aŭtoro de la frazlibro ***Le Gascon de Poche*** (*La enpoŝig-ebla gaskona lingvo*) ĉe tutnacia franca eldonejo **ASSIMIL**.

Kaj nun dum la printempo de 2006 aperis du el liaj produktaĵoj, ŝajne sen rilato (sed malfidu!):

Dua esperanta disko ĉe **VINILKOSMO** titolita ***jOmO SLAVUMAS***, vera duopa albumo de mondmuziko (24 pecoj), kie miksiĝas muziko rusa, jida, cigana, ukraina, kaj pola. Kunludis tuta orkestro de naŭ muzikistoj kun kiuj li kutime surscenas (violono, zimbalono, basbalalajko, buzuko, kontrabaso, drumo).

Unua romano en okcitana lingvo (ankaŭ konata kiel provenca lingvo) ĉe **IDECO** eldonisto, baptita ***Ucraïna***, rakontanta la aventurojn de angla ĵurnalisto, atestanto dum la jaro 1920 de anarkiisma epopea ribelo gvidita de **Nestor Maĥno**.

Okazis renkonto-aperitivo-koncerteto la 6-an de junio en koncertejo **BIJOU** de Tuluzo por babili pri tiuj du produktoj de Jean-Marc LECLERCQ. Ĉeestis la diversaj kulturaj koncernitaj agantoj: Institut d'Estudis Occitans 31, IDECO, VINILKOSMO, Jean-Marc IZRIN (aŭtoro de la *Liberecanoj de Jidlando*, eldonejo Le Coquelicot), ESPERANTO-KULTUR-CENTRO, La Trappe (surbendigejo), la franc-ukrainaj asocioj JAROSLAVNA et SOLNICHKO, CNT.

# (81)

**Du kursoj en Albi** (komencantoj kaj progresantoj) funkciis la tutan jaron, gvidataj de Claudine Lentz.

**Lavaur: La kurso** de Daniel Maynau daŭre okazas kun deko da partoprenantoj, alterne en vilaĝoj Garrigue kaj Belcastel.

## Manĝo-klaĉo – 9-an de junio

Festa manĝo-klaĉo estis invitita en Belcastel, kie renkontiĝis 20 esperantistoj, inter kiuj kelkaj lokuloj.

## Mazamet: Asocia kafejo planata

Sinjorino malfermonta asocian kafejon en tiu urbo deziras enkonduki esperanto-kurson en ties aktivecoj. Christian PONS kontaktos ŝin.

# (09) Arrout: du semajnfinaj kursaroj

Printempe okazis du semajnfinaj kursaroj: (Découverte et Pratique de l'espéranto)
1-2-an de aprilo, dek kvin kursanoj (komencantoj kaj parolantoj)

13-14-an de majo, dudeko da kursanoj en tri niveloj: la pli alta estis la pedagogia kurso sub gvido de Renée Triolle, aŭtoro de pluraj lernolibroj.

## (09) Mirepoix et Foix

Kursoj okazis, sed ĉesis en Foix, pro manko de instranto.

# (12) Villeneuve d'Aveyron

Kurso funkciis la tutan jaron sub gvido de André ANDRIEU.
Ankaŭ standoj okazis en la departemento.

***Ĉu vi ne vidis vian departementon? Verŝajne vi ne raportis pri okazaĵo….***

**OPINIO**

# Plano por asociigi la bazajn aktivulojn al la strategiaj decidoj

## "Ĉu utilas naciaj esperanto-asocioj?"

Eble vi memoras, ke mi provis lanĉi tiun debaton en la Cirkulero de februaro 2006, sed apenaŭ havis eĥon. Unu aŭ du respondis ke ili konsentas kun mi, sed neniu esprimis detalajn aŭ novajn ideojn pri la temo.

Tial mi nun proponas precizan planon ŝanĝi la kotiz-sistemon de niaj lokaj asocioj, tiel ke ĉiuj **subtenu nacian asocion, sentu sin membro de pli vasta komunumo, kaj kompreneble rajtu voĉdoni kaj kundecidi la orientiĝon de tiu asocioj.**

La plano estas:

Pagi ununuran ne tro altan membrokotizon, el kiu parto iras al la nacia nivelo, parto al la regiono, kaj parto al la loka – kiam ekzistas loka klubo.

Baza kotizo: **29 eŭroj**

dividiĝas en:

| | |
|---|---|
| Nacia parto | 10 |
| Regiona parto | 04 |
| Loka parto | 15 |

La loka kaj regiona parto povus esti ŝanĝitaj (aŭ inversitaj), laŭ konsidero kion faras kiu. Ekzemple, se la regiona asocio zorgas pri informprelegoj, prelegoj de eksterlandanoj, lingvaj kaj pedagogiaj semajnfinoj, organizo de koncertoj, de renkontighoj, lobiado ĉe politikuloj kaj/au elektitoj, havas ejon kaj bibliotekon, librostokon, ktp., tiam ĝi ricevu pli grandan sumon. Sed nuntempe en nia regiono tiujn taskojn surprenas ĉefe la lokaj kluboj. Tial mi proponas tian disdividon, ĉiuokaze diskuteblan.

Kion vi opinias pri tiu propono? Kion oni opinias en via klubo?

Mi tre volonte ricevus viajn komentojn, kritikojn kaj ideojn pri kio estas farenda, kaj kiu plejefike faru kion.

– Jeanne-Marie CASH